

Omaĝo al radioaktive poluita tero

En la malgranda hejma ĝardeno, kiun mi tre amas,
junaj laboristoj el fora gubernio deskrapas surfacon de
la tero per ŝovelilo.

“Kiel mi traktu la florojn?” li demandas,

“Vi elradikigu ilin kaj forportu kun la tero, ĉar ankaŭ ili
estas poluitaj,” mi respondis kun malespero.

Tiuj floroj bele floris multajn jarojn en mia ĝardeno,
ĉar mi prizorgis ilin kun amo.

Kaj teron mi fekundigis per multjara laboro.

Kiam mi translokiĝis ĉi tien,

la tero estis malmola kaj ne vivis eĉ unu tervermo.

Dum la pasintaj 30 jaroj mi kulturis ĝin kaj igis ĝin pli kaj
pli fekunda.

Nun sur ĝi floras floroj, kreskas kukumoj kaj fruktas
persimonoj.

La laboristoj deskrapas surfacan teron senvorte,
kaj metas ĝin en malgrandajn kestojn.

Multiĝas kestoj, kestoj kaj kestoj.

“Ni finis laboron”, vokis min la laboristoj.

Mi malfermis la pordon, kaj ve! tie estis verda monteto da
poluita tero.

“Deskrapita tero estas en ĝi”.

“Ni kovris la kestojn per nepoluita tero”.

“La tuton ni kovris per verda tuko, do estas duoble
sekure”.

“La forteco de radioaktiveco en la ĝardeno estas malpli ol

0,23 mikrosivertoj hore*¹, nome malpli ol la maksimuma normo. Via ĝardeno nun estas sekura”.
Ne ŝercu! Ja povas esti, ke ĉi tie estas sekura, sed ĉiun fojon, kiam mi eliros el mia domo, mi devos vidi la radioaktivan monteton!
Vi belege videbligis radioaktivecon!
Kiam la laboristoj forlasis, mi mezuris radioaktivecon de la ĝardeno.
Ve! la ĝardeno estas ankoraŭ sufiĉe poluita.

Laboristoj pli multaj ol la vilaĝanoj senpoluigas kampojn. Per buldozoj ili deskrapas surfacan teron, kaj metas ĝin en nigrajn sakojn nomatajn “*flecon-bag**²”.
Sur ili estas skribite: “La sako estu konservata en ĉambro”.
Sed nenie ekzistas tiel granda ĉambro por tiom da nigraj sakoj, tial la sakoj estas lasitaj sub la ĉielo.
En somero la suno tiel varmigas la sakojn, ke oni povus kuiri ovon sur ili.
En vintro neĝas kaj frostas, do eĉ se ili estas faritaj el fortegaj fibroj, ili ne daŭros longe.
Sur ili estas skribite ankaŭ: “La sako eltenas 3 jarojn (900 horojn)”,
Jam pasis preskaŭ 5 jaroj, do sakoj lasitaj sub la ĉielo certe komencis rompiĝi.

Vi, tero, estas kompatinda, enfermite en tiujn nigrajn sakojn.
Antaŭ 1000 jaroj aŭ 2000 jaroj, homoj komencis loĝi ĉi tie

kaj kulturi vin.
Komence vi ne donis al ili bonan rikolton.
Homoj falçis herbojn en montetoj kaj disçjetis tiujn sur vin
kiel sterkaçojn,
Çevaloj kaj bovinoj miksis siajn fekaçojn kun vi, kaj
homoj ŝvitante plugis vin.
Vi fariçis pli kaj pli fekunda kaj donis al la homoj riçan
rikolton kaj feliçon.
Homoj laboris por vi.
Vi estas trezoro por ili.
Çis antaŭ tiu tago, vi donis al ili bonan rikolton, kontenton
kaj feliçon,
sed tiuj laboristoj senkomplete deskrapas vin.
Vi, poluita tero!
Vi estis kristaloj el sango kaj ŝvito de la prauloj,
Vi estis fonto, el kiu naskiças bona rikolto kaj feliço.
Çu la laboristoj komprenas tion?
Çu TEPCO kaj la çefministro komprenas tion?

Oni metas nin en tiujn sakaçojn, çar ni estas poluitaj de
radioaktiveco,
Oni cerbumas, kien oni forçetu nin, traktante nin kiel
venenon,
Sed pripensu.
Ni estis kristaloj el sango kaj ŝvito de la prauloj.
Ni povus esti eterne utila por la postaj generacioj,
Ni povus doni riçecon eterne,
Sed kio okazis al ni? Kio okazis al ni!
Ni estas metitaj apud loçkvartaloj,

Ni estas lasitaj apud kampoj,
 Ni estas kaŝitaj inter montetoj.
 Baldaŭ ni estos transportitaj al provizoraj konservejoj
 apud la difektita nuklea centralo,
 Kaj tie ni dormos dum 30 jaroj.
 Sed eĉ post 30 jaroj el ni ne malaperos radioaktiveco, do
 oni ne povos uzi nin por ĝardenoj, nek por kampoj.
 Se ni estos liberaj de radioaktiveco, ni povos utili por ĉiuj
 homoj, por ĉiuj vivaĵoj kaj por ĉiuj kreskaĵoj, sed tio
 ne okazos, tio ne eblos.
 Kio okazo al ni post 30 jaroj?
 “Vi iros al la finaj konservejoj ekster Fukuŝima”.
 Kie ili estos?
 “Neniu scias”.
 Kiom longe ni estos tie?
 “Neniu scias”.



Mi rememoras usonan filmon en 1971 titolitan “Johnny prenis sian pafilon” (*Johnny got his gun*)

Dum la unua mondmilito Usono partoprenis en la milito. Junulo Joe Bonham el Colorado estis sendita al batalkampo en Eŭropo. Bombo eksplodis kun bruego, kaj Joe vundiĝis serioze, kaj kuŝas sur lito en ambulanco kiel “nekonata vundito n-ro

407”.

“Liaj brusto kaj abdomeno ne estas vunditaj”.

“Lia nomo?”

“Ne konata”.

“Ni kuracos. Ni respondecos pri li”.

“Vi bezonos multe da tempo”.

“Ne gravas por tiu valora eksperimentaĵo”.

“Li estas senkonscia”.

“En lia cerbo nur la oblonga medolo*⁴ estas sendifekta. Sekve liaj koro kaj spircentro funkcias. Alivorte li vivas”.

Tiu vundito n-ro 407 fariĝis eksperimentaĵo por savi aliajn vunditojn.

Li morsis SOS-n per kapobalacado.

“Mi volas iri eksteren por ke homoj povu vidi min kaj sciu, kio mi estas. Lasu min iri eksteren kiel spektindaĵo en karnavaloj”. “Se vi ne volas montri min al la publiko, mortigu min!”

“Injektu al li trankviligaĵon”, ordonis la diviziestro. “Tiu ĉi afero estas konfidencaĵo”.

Joe estis postlasita sola en la stokejo.

(Mi nun komprenis. Ili lasas min ĉi tie sekrete ĝis mi maljuniĝos.)

(Ĝis tiam mi krios en mia koro, kriegos kiel sovaĝa besto en kaptilo.)

(Sed neniuj havos intereson pri mi.)

(Se mi havus brakojn, mi povus mortigi min. Se mi havus krurojn, mi povus forkuri. Se mi havus voĉon, mi povus paroli.)

(Eĉ se mi krios por helpo, neniuj venos helpi min.)

(Sed mi devas fari ĉion, kion mi povas.)

(SOS. Helpu min!)

(SOS) (SOS) (SOS)

Jes, ni nun komprenis. Ni, poluita tero, estas Joe en la filmo.

Por ke homoj ne sciu kruelon de militoj,

Joe estis enfermita en la stokejon kiel eksperimentaĵo.

Por ke homoj ne sciu kruelon de nukleaj akcidentoj,

ni estas fermitaj en nigraj sakoj.

Poste ni plu estos fermitaj en la provizoraj konservejoj,

kaj pli poste ni estos transportitaj al finaj konservejoj eble neniam konstruotaj,

kaj tie ni vivos eterne kiel eksperimentaĵoj,

aŭ povos esti, ke ni eĉ ne fariĝos tiaj.

Ni vivos en tiuj konservejoj tute mallumaj,

dum kelkdek jaroj, aŭ kelkcent jaroj,

kaj fine ni estos forgesitaj.

SOS, SOS, SOS.

Nun ni elsendas SOS-on,

sed ne nur ni sed ankaŭ aliaj elsendas SOS-on.

Akvo elsendas SOS-on.

La maro elsendas SOS-on.

La ĉielo elsendas SOS-on.

Morgaŭ ankaŭ vi elsendos SOS-on,

fariĝante niaj kolegoj.

*¹ 0,23 mikrosiverto hore: La japana leĝo decidas, ke la loko poluita pli ol 0,23 mikrosivertoj hore devas esti purigita.

*² flecon-bag: flexible container bag, fleksebla sako.

*³ Johnny got his gun: usona kontraŭmilita filmo verkita kaj reĝisorita de Dalton Trumbo en 1971.

*⁴ oblonga medolo (angle *medulla oblongata*): parto de la cerbo, kiu ludas gravan rolon por spirado, digestado ktp.

